

B. 45

Nº 1.

1ª de Januaro 1913.

La traduko kaj publikado de niaj artikoloj estas permesata, nur sciigante la devenon



REVUO

DE

ESPERANTA PSIKISTARO



La sola vere internacia, kunlaborada revuo traktanta pri ĉiuj psikaj sciencoj, (magnetismo, hipnotismo, spiritismo, universalismo, telepatio, k.t.p.) en Esperanto.

Redakcio - Sekr. : A. STAS

Bureau International du Spiritisme

Waltwilder par Bilzen

Belgujo

ENHAVO

Komunikaĵoj, k.t.p.
Raporto pri la Subkongreso en
Krakovo, Aŭg. 1912, Sº A. Stas.
Parolado de Sº J. Mareš.
Letero de Sº Chaigneau.
Paroladoj kun Sº W. T. Stead, de
Mijatoviĉ.
Principo de Dueco, de Sº J. Novotny.

705.234 - B Ep -

NI RICEVIS LA SEKVANTAĴN PUBLIKAĴOJN

EL

Esperanto	Genevo
Ondo de Esperanta	Moskvo
La Movado	Paris
Le "Fraterniste",	Douai (France)
Lumen	Tarrasa
Self Culture	Kizanattam (India)
Germana Esp.	Berlin
Le Messenger	Liège
La Movado	Taubaté (Brazil)

ELSPEZOJ

Poŝtelspezoj Okt.	Fr.	24.—
id. Nov.	"	5.—
id. Dec.	"	5.—
Luprezoj de ĉambrego en Krakovo	"	35.—
Presspezoj de la « REVUO »	"	150.—
Poŝtelspezoj.	"	25.—
	Fr.	244.—
	Enspezoj ^(*)	Fr. 123.30
	Deficito ^(*)	Fr. 120.70

(*) (vidu paĝo 23)

Je 1^a de Januaro 1913.

KOMUNIKAĴOJ

Nia komitatano S^o Schriewer propagandas por Esperanto en Ĥinujo, kaj kun la helpo de Ĥino gramatistiko baldaŭ eldonos Ĥinan lernolibron por Esperanto.

S^o Machada Fosta, nia nelacigebla komitatano, alportis 24 abonojn por Rio de Janeiro **nur**, kaj 3 por Brazilujo.

S^o Mansfeld alportis 3 abonojn.

Monaj helpoj estas ĉiam danke akceptataj.

La traduko kaj publikado de niaj artikoloj
estas permesata nur sciigante la devenon

Revuo de Esperanta Psikistaro

TRIMONATA PSIKISMA GAZETO

ABONPREZO

Sm.	1.00
F.	2.50
M.	2.00
	2/
\$	0.50
Rubl.	1.00

KOMPRENAS

KOTIZAJON

AL

**ESPERANTA
PSIKISTARO**

Honora Prezidanto

R^o E. BOIRAC

La sola vere internacia, kunlaborada
revuo traktanta pri ĉiuj psikaj sciencoj
(magnetismo, hipnotismo, spiritismo,
universalismo, telepatio, k. t. p.) en
Esperanto.

ENHAVO

Komunikaĵoj, k.t.p.

Raporto pri la Subkongreso en Krakovo,
Aŭg. 1912, A. Stas.

Parolado de S^o J. Mareš.

Letero de S^o Chaigneau.

Paroladoj kun S^o W. T. Stead de
S^o Mijatoviĉ.

Principo de Dueco J. Novotny.

Redakcio kaj Administracio

Sekretario A. STAS

Bureau International du Spiritisme

Waltwilder par Bilsen, Belgujo

Iniciatinto J. C. CHAIGNEAU,

PARIS, 6, rue de Douai

Komitatanoj :

AMIKEJO — K. Schriewer, Légation de Belgique
Pekin-Chine.

HISPANUJO — D. J. de Nogales, Ciudad Rodrigo.

GERMANUJO — Meiler, Nordendstr., 34, München.

AUSTRIO — D^o Rosenstock, Krakovo.

BRAZILIO — J. Machado Fosta, Telegraphos, Rio.

Ĉilujo D^o Fraga, Prez. de Ĉila Esp. Asocio,
Santiago de Chile.

USONO — D^o Schubert, North Capitolstr. Was-
hington. D. C.

MORAVIO — Joza Mares, Luhacovice, (Banloko).

Ĉekbankkonto 563.

ÖNB



+Z65496408

ENSPEZOJ

ABONIS :

	Abon- prezo frankoj	Mon- helpo frankoj
S ^o Troula, rue Saige, 8, Monaco.	2.50	7.50
S ^{ino} Marcelle Tiard, 19, rue de la Réunion, Parc-St-Maur.	2.50	
S ^o G. Mansfeld, Wilhemstr., 4, Merseburg/S.	2.50	
» Krietsch, Hüttenstr., 4, Halle/S.	2.50	
» Schmiedeberg, Schlossgasse, 25, Delitsch.	2.50	
» Sineokoff, A., Georgstr., 1 i Hamburg.	2.50	
» H. J. Matta, Sete Casas-Loures, Port.	2.50	0.50
» A. O. Ehlin (Svedujo) Sala.	2.50	
» M. Czervinski, Vladimierska, 8, m. 6., Varsovio.	2.50	
S ^{ino} A. M. Grineva, Staracerkask'o, Don.	2.50	
Fin ^o E. M. Grineva, Kamenec (Pod.).	2.50	
S ^o L. Levenzon, Vladimierska, 78, Kiev.	2.50	
» E. Isabelle, 18, rue Dinanderie, Rouen S. I.	2.50	
» Nik. Eger, Alleestr., Dorpat, Russie.	2.50	
» Paul Lecerf, 58, rue de Fontenelle, Rouen.	2.50	5.30
» Ed. Bresson, Tour d'Auvergne, La Flèche.	2.50	
» E. Loth, Solitude, 29, Lausanne.	2.50	
» J. Novotny, Skuhrov Zelek Brod, Bohemujo.	2.50	
» Mende, 35, rue Dupuch, Alger.	2.50	
» G. Naudin, rue d'Ulm., 30, Paris.	2.50	
» João Celani Junior, Avenida Passos, 28, Rio de Janeiro, Brazil	2.50	
» Anisio M. Braga, r. Marques de Pombal, 28, id.	2.50	
» Sizemaudo Camara, r. General Pedra, 357, id.	2.50	
» Joaquim L. V. Guimarães, r. Silveira Martins, 30, id.	2.50	
» Carlos Velozo, r. de Setembro, 163, id.	2.50	
» Oscar Moreira, r. Eugenio de Dentro, 177, id.	2.50	
» João Sa, r. do Rezende, 103, id.	2.50	
» Dorval C. G. Botelho, r. Eugenio de Dentro, 188, id.	2.50	
» D ^o H. Motto Mendes, Eschola Polytechnica, id.	2.50	
» Arminio de Moraes, r. da Alfandega, 17, id.	2.50	
» Jayme Gonçalves Nunes, r. Elioni d'Almeida, 27, id.	2.50	
» Manoel Faria Pereira, 10, r. Voluntarios do Patria, id.	2.50	
» D ^o A. Couto Fernandes, r. Rosso, 41, id.	2.50	
» Vianna de Carvalho, Avenida Passos, 28/30, id.	2.50	
» Archelao Neiva, r. 1 ^o de Março, 90, 2 ^o andar, id.	2.50	
» Honorio Rivereto, Telegrapho Nacional, id.	2.50	
» Aluisio de Siqueira, Telegrapho Nacional, id.	2.50	
» Joaquim da Rocha Cerqueira, Telegrapho Nac., id.	2.50	
» Odillo Pinto, 2, Barao de Petropolis, 100, id.	2.50	
» Alekso Fanzeros, rua S. Pedro, 197, id.	2.50	
» D ^o João da Gama, Filgueiras Lima, r. 24 de maio, 90E, id.	2.50	
S ^o D ^o Ev. Backhäuser, r. Rejenaração, 14, E. do Rio, Niteroi.	2.50	
» Pedro Costa, E. do Rio, Porto da Madama.	2.50	
» Samuel Cardoso, E. do Rio, Alcantara.	2.50	
ENSPEZOJ = 123.30.		
		110.00 13 30

ALVOKO

de

ESPERANTA PSIKISTARO

Nun la **longtempe dezirita**

REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO

ekzistas kaj ĝia prosperado nur dependas de la kunlaborado de *ĉiuj duoble samideanoj*, magnetistoj, hipnotistoj, spiritistoj, telepatiistoj universalistoj, ktp.

Ĉiuj psikistoj kiuj okupiĝas pri Esperanto kaj ĉiuj aliaj kiuj aprobas ĝian celadon **devas nepre aboni** kaj sendi al ni artikolojn, ĉu esperante, ĉu nacilingve verkitajn.

La Sekretario

A. STAS

INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO. - KRAKOVO

RAPORTO PRI LA

SUBKONGRESO DE ESPERANTA PSIKISTARO

RYNEK, 43.

Malferma kunsido, 12^a de Augusto

Ĉeestis 30 personoj el 15 diversaj landoj. La sekretario post saluto al Polujo kaj Aŭstrio raportas pri la laboroj de ESPERANTA PSIKISTARO dum la pasinta jaro.

Dank' al la mona helpo de la BELGA FEDERACIO SPIRITISTA oni povis eldoni la "RAPORTON PRI LA SUBKONGRESETO DE ESPERANTA PSIKISTARO" en ANTVERPENON, kiu havis multe da sukceso. Dum la monato Marto de la nuna jaro oni povis eldoni la esperantan tradukon de la libreto "RESUMO DE LA KURSO PRI TEOLOGIO" de Kavaliro Le Clément de St-Marcq, kiu estas aĉetebla ĉe la esperantistaj librovendistoj po 20 cm.

La ĉeestantaro elektas la sekvantajn novajn komitatanojn :

Sinjoroj :	FRAGA	SANTIAGO DE CHILE
	SCHUBERT	WASHINGTON, USONO
	JOSE MACHADO FOSTA	RIO DE JANEIRO
	JOZA MARES	MORAVIO

La sekretario klarigas la necesecon por krei gazeton kiu disvastigus la ideojn de ESPERANTA PSIKISTARO en la tuta mondo. La societo tamen ne estas sufiĉe riĉa por eldoni tian Revuon. Efektive oni bezonus 300 abonojn po frs 2,50 = 1 Sm. jare por starigi trimonatan revuon.

Oni tial decidis ke oni adresiĝu al la ĉefaj spiritismaj unuiĝoj en la tuta mondo, petante ilin, ke ili subskribu kelkajn abonojn

La Federacio Spiritista Belga jam subskribis 40 abonojn.

La "REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO" ekaperos la 1^{an} de Januaro 1913.

Salutoj

S^o J. C. Chaigneau, el Parizo, per bela letero, esprimas sian bedaŭron ke li ne povas ĉeesti la kongreson.

S^o K. Schriewer salutas la kongreson de ESPERANTA PSIKISTARO, el HINUJO (Peking’).

Poste, la sekretario, en kelkaj vortoj klarigas al la Kongresanoj la komunikaĵojn ricevitaĵojn de S^o W. T. Stead, laŭ la bela raporto de S^o MIYATOVITCH, kies esperanta teksto estas de S^o J. C. Chaigneau.

EKSPERIMENTOJ

Kun la medio de glosolalisto.

(Mediumeco kiu konsistas el la kapablo de la medio por paroli en lingvoj, kiujn li ne konas).

La medio, S^o T. veke entranciĝas, komencas elparoli sonojn, konsonantojn, eĉ tutaj frazojn. Tiuj paroloj, nekonataj de la ĉeestantoj ŝajnas aparteni al unu sola lingvo. Ofte la subjekto ŝanĝas la sonon de sia voĉo, la vortoj kaj frazoj ankaŭ ŝanĝiĝas; estas alia lingvo.

S^o Romano diras ke li ekaŭdis kelkajn turkajn frazojn.

Ĵurnalistoj dum tiu kunveno ĉeestis.

La kongresanoj interkonatiĝis; 150 ekzempleroj de la bone konata gazeto « LE FRATERNISTE » estis je la dispono de la publiko; ankaŭ tuta jarkolekto de la « VIE MYSTERIEUSE » estis tre ofte konsultata de la anoj, duoble-samideanoj, komprenantaj la francan lingvon. La libro de S^o GIROD « COMMENT DEVELOPPER UN SUJET » interesis grandan nombron de niaj esperantistaj fratoj. Ankaŭ kolekto de « LA TRIBUNE PSYCHIQUE ».

2^a KUNSIDO. — 13^a de Aŭg.

La sekretario legas la leteron de S^o PAUL NORD, kiu prezentas siajn bondezirojn al la kongreso.

S^o MARES parolas dum unu horo pri la mediumaj desegnaĵoj, vere interesantaj, obtenitaj en Moravio kaj Bohemujo. Tiu priparolado estis atente sekvata kaj forportis grandan sukceson.

La eksperimentoj kun la medio de glosolalisto, S^o T. estis daŭrigataj; ĉeestis reprezentantoj de la hindaj kaj semitaj lingvoj, Soj S^o SORABY el Angla Hindujo kaj ROMANO el KONSTANTINOPLO.

TRIA KUNSIDO. — 16^a de Aŭgusto.

Multnombra ĉeestantaro.

S^o MARES prezentas la bondezirojn de la FRATA UNUIGO de BOHEM-SLAVAJ SPIRITISTOJ, kaj tiu lasta Societo bonvolis prezenti al ESPERANTA PSIKISTARO sian moralan kaj monan helpon. S^o MARES kaj la delegitoj bohem-slavaj estis varme gratulataj.

S^o J. de Nogales, el Ciudad Rodrigo, kiu estas unu el niaj plej sindonaj samideanoj, salutis la sub-kongreseton en la nomo de la hispanaj spiritistoj.


Tiptologia Eksperimento

Pola soldato el LODZ, nome NIKOLAYEFF, kiu estis mortigita dum la Franc-Rusa milito en la jaro 1812, manifestiĝis; li tamen ne volis doni pluajn detalojn.

KONKLUDOJ

La subkongreseto de ESPERANTA PSIKISTARO en Krakovo estis granda sukceso kaj entusiasmigis multajn.

Sekretario A. STAS



1a KUNSIDO

12^a de Augusto, RYNEK, 43, KRAKOVO.

Inter aliaj ĉeestantoj :

Joza Mareš,	Luhacovice, Moravio.
A. Stas,	Antverpeno.
J. de Nogales,	Ciudad Rodrigo.
J. Schnietzer,	Lwów.
Frach J. Sorabij,	Cambridge.
M. Wundermann,	Stryj.
Ant. Kudela,	Roznov.
Michel Romano,	Konstantinoplo.
Vol. Antonio,	Stryj.
Olarich Istka,	Ŝtramberk.
D ^r A. Godšovski,	Lisko.
St. Lazica,	Lwów.
St. Teodorczuk,	Stryj.
Marie J. Bernard,	Angers, Francujo.
R. Duvoy,	Lyon, Francujo.
Marcelle Tiard,	Parc St Maur, Francujo.
Amélie Blondin,	Nice, Francujo.
K. Haltmar,	Valaŝ, Moravio.
J. Littauer,	Varsovio.
G. Teltschik,	Graz.
Weiner,	Pardulice, Bohem.
Reiner,	Sambor, Galicio.

KOMUNIKAĴOJ LEGITAJ

de **S^o B. F. Schubert**

WASHINGTON D.C.

Mi ĵus legis en la ĉi tiea Herald, ke Spiritualismo faris grandan paŝon antaŭen, ĉar estas starigita profesorejo pri spiritualismo en la Leland Stanford Universitato. La frato de fondinto de la Universitato malavare donacis sufiĉe grandan sumon por esplori kaj instrui pri psikologiaj fenomenoj. Tiu ĉi estas la unua fojo ke Universitato malkaŝe faras tian gravan paŝon.

de **S^o K. Schriewer**,

EL PEKINGO

Mi gratulas « Esperanta Psikistaro » pro ĝia agemeco, donante kursojn de Esperanto al la psikistoj.

Mi faras nun malgrandan studon pri la religiaj ideoj de la ĥinoj; ili multe kredas en la spiritoj.

Kun la helpo de ĥina gramatikisto mi faros ĥinan esperantolernolibron, kiu aperos baldaŭ.

DEZIRO.

Ĉiuj niaj anoj devas peti la gazetojn esperantistajn de sia regiono, ke ili insertu la artikolojn de Esperanta Psikistaro. Vi ĉiuj ricevis niajn tri broŝurojn: « Esperanta Psikistaro », « Raporto pri la Kongreso », « Kurso pri Teologio ».

Dua KUNSIDO

13^{an} de Aug. '12

Inter aliaj ĉeestantoj:

Joza Mareŝ,
Margarethe Noll,
Juliusz Kriss,
Ad. Fugster,
Ignaz Weisstein,
Emiĥo Pfeffer,
Henryk Aunch,
H. Wierzchowski,
A. St. Reiner,
M. Ĉervinski,
S. Feodorezuk,
A. Stas,
J. Schmietzer,

Luhacovice, Moravio.
Kopenhago.
Krakau.
Lazy.
Lemberg.
Krakau.
Krakau.
Lwów.
Sambor, Galiz.
Varsovio.
Stryj.
Antverpeno.
Lwów.

KOMUNIKAĴO

de **S^o Paul Nord**

Al ĉiuj esperantistaj gekongresanoj,

Via nomo enhavas la plej dolĉan el la simboloj.

En nia epoko de konkurbataloj kaj disreviĝoj, rezultantaj de profunda nescio de la natura solidareco kiu nin ĉiujn mallarĝe unuigas, la Espero de vivo nova por la Homaro fermentas en la fundo de l'koro de multaj el niaj homaj gefratoj.

Efektive novaj tempoj prepariĝas.

Ni jam parolis pri tiu temo en « Esperanta Psikistaro ». La

afabla akcepto kiun tie ni trovis, la multnombraj korespondaĵoj kiujn sendis al ni, pri tio, esperantistoj el multaj diversaj regionoj, kaj la simpatio kiun ni sentas por la helpa lingvo, propagandilo de paco kaj progreso, instigas nin manifesti nian ĝojon pri la granda frata festo kiu vin kunigas kaj pri la nobla idealo kiu vin unuigas.

Ĉerpu el tiu kontakto la novajn fortojn kiuj precizigos pli kaj pli ĉiutage vian grandan aferon.

La movado de akordiga universalista sintezo grupigas la bonajn fortojn kaj la bonajn voladojn tiamaniere ke ili formu faskon de superega unuiĝo por la fervora liberigo de la granda homa familio, pacigita per la kompreno de l' destino kaj pli preciza antaŭseno de ĝia pli bona estonteco.

La misio de la 20^a jarcento estas realigi la idealon de Libereco kaj Egaleco rilate al la leĝoj de la vivo por realigi la Fratecon.

La tasko estos malfacila, sed kiom bela kaj inda je vi, kiuj estas misiistoj de Espero.

Ni ĉiuj unuiĝu por la triumfo universalista de la Vero, por la konkero de mondo pli bona.

Al ĉiuj frate,

PAUL NORD

Ĝenerala Sekretario

de la Universalista Unuiĝo Konkordiana,

Idealfokuso por pli bona vivo,

Ĝenerala Konfederacio de la Penso

por la ĝenerala progreso kaj la socia paco.

3a KUNSIDO

16^{an} de Aug. '12.

Inter aliaj ĉeestantoj :

Irach J. Sorabji,

Romano,

Bed Weiner,

K. Szemsky,

Joza Mareš,

K. Szewczyk,

A. Stas,

Combet,

M^{lle} R. Schepens.

Marya & Adela Malinowka,

Juliusz Kriss,

J. de Nogales,

A. St. Reiner,

D^o Godtowski & Helena,

St. Lazice,

I. Weisstein,

Hindujo.

Konstantinoplo.

Pardulice, Bohem.

Nova Paka, Boh.

Luhacovice.

Loukau i/Schl.

Antverpeno.

Tunis, Afriko.

Gand, Belgujo.

Oswiecim II Gal.

Krakau.

Cuidad Rodrigo, Hisp.

Sambor.

Lisko.

Lwów.

Lemberg.

Elektio de S^o Mares Kiel Komitatano de Esperanta Psikistaro

S^o Mareŝ estis varme gratulata kaj Esperanta Psikistaro dankas al la Frata Unuiĝo de Bohem-Slavaj Spiritistoj por la jenaj decidoj :

“Frata Unuiĝo de Bohem-Slavaj Spiritistoj”

faris en sia kunveno 14/7 1912, la jenan decidon :

1. “F. U. de B. S.” alvokos siajn membrojn, ke ili aliĝu al “Esperanta Psikistaro”.
2. Ĝi mem aliĝos kiel membro de la “E. P./oficiale/
3. Per sia reprezentanto ĝi volas esti en la konstanta komunikado kun la “E. P.”
4. En sia of. organo “Posel Zahrobni” ĝi malfermas esper. rubrikon kaj raportos pri la “E. P.”
5. Laŭ ebleco ĝi volas helpi “E. P.” morale eĉ materie.
6. La estraro de “E. P.” estas petata, ke ĝi kunvoku trian subkongreson en la kongresejo de la nuna esper. kongreso en la jaro 1913.

En la nomo de la :

“FRATA UNUIĜO DE BOHEM-SLAVAJ SPIRITISTOJ”

JAN VĚCHET,
Sekretario.

KAREL SEZEMSKY,
Prezidanto.

Eksperimenta Tiptologio

Ĉirkaŭ la tablo, Fino Malinowka, Soj de Nogales kaj X.
La tablo diktas :

NIKOLAYEFF LODZ

Demando : kiam vi mortis ?

1812.

ĉu en batalo ?

jes.

en Lodz ?

jes.

batalo inter Francoj kaj Rusoj ?

jes.

Intima Nokta Kunveno

16^{an} de Aug. '12, je la 11^a vespere

Ĉeestantoj :


R. Bojaĝiev,	Sofia.
J. Kurtanoff,	Cindad Rodrigo.
J. de Nogales,	Hindujo.
Frach J. Sorabji,	Lwów.
B. Skalkowski,	Luhaĉovice.
J. Mareš,	Novij Saĉ.
S. Geksa,	Antverpeno.
A. Stas,	

TIPTOLOGIO. — Ĉirkaŭ la tablo Soj Sorabji, de Nogales, Mareš :

La tablo faras kelkajn movojn laŭ demando. poste diktas «kejhi» ; leviĝas la tablo sur du piedoj, sur unu piedo, post demando por tuta leviĝo nur du frapoj.

La komunikaĵoj estas tre malrapidaj kaj nekompreneblaj. Ni ŝuldas la malsukceson de la eksperimentoj al la fakto ke en Krakovo ne ekzistas unu sola propra tabla medio.

La Sekretario, A. STAS.



Parolado de la Sekretario en Krakovo

KARAJ GESINJOROJ,

Kiel promesite okaze de la fermo de la unua subkongreseto de Esperanta Psikistaro dum la sèpa kongreso en Antverpeno, nia kara unuiĝo, dank'al la fervora kunhelpo de S^o D^o Rosenstock, organizis sian duan kongreson en la Krakova urbo.

La ricevo, kiun rezervis al ni la ĉarma pola popolo estis, mi povas diri, entuziasma. Esperanta Psikistaro ne povas preterlasi esprimi sian dankon al la Krakova urbo kaj al la Aŭstriaĵ samideanoj. Vivu Krakovo! vivu niaj polaj samcelantoj, vivu Aŭstrujo.

Dum la kongreso en 1911 ni elektis komitaton; neniuj ŝanĝo devas esti alportata al tiu komitato, sed mi proponas la sekvantajn aldonojn:

S^o Fraga, por Ĉilo, Prezidanto de la Ĉila Esp. Asocio, Santiago.

S^o Schubert por Usono, Washington.

S^o José Machado Fosta, por Brazilio.

Depost la fermo de la Kongreso de 1911, Esperanta Psikistaro faris grandajn progresojn kiel vi ĉiuj vidis per la gazetoj.

Nia unua laboro estis eldoni la raporton pri la subkongreseto. Dank'al la mona kunhelpo de la Belga Spiritista Federacio ni povis starigi tiun grandan aferon. Aperis la Raporto kaj preskaŭ ĉiuj gazetoj parolis pri ĝi, mi povas diri, laŭde.

Ĉe ni alvenis centoj da demandoj kaj kelkaj aliĝoj, sed nelacigeble ni laboris kaj vi ĉiuj konfesos ke nun « Esperanta Psikistaro » estas ĉie konata unuiĝo. Mi ne bezonas diri ke estas la devo de ĉiu ano de « Esperanta Psikistaro », studi bone la programon de nia societo, kaj fari ĉion eble por efektiviĝi ĝiajn emojn. Varbi anojn estas necesaĵo.

Nu, mi devas atentigi vin je la sekvanta punkto: la propagando per la gazetoj.

Ke la mondo sciu kiuj estas niaj ideoj, jen la plej bona propagando. Kaj ni nur povas sukcesi je tio, kiam la gazetoj en la tuta mondo publikigos niajn artikolojn.

Vi ĉiuj ricevis ekzemplerojn de niaj publikaĵoj:

„Esperanta Psikistaro“, „Raporto pri la Kongreseto de 1911“, „Kurso pri Teologio“.

Kun tiuj tri broŝuroj iru ĉe redaktoro de gazeto, esperantista gazeto aŭ ne, diru lin ke li povas inserti niajn artikolojn *senpage*, se li rifuzas insistu, se li elpelas vin, revenu, ĝis la tago, kiam li, tute lacigita per viaj insistoj, akceptos la artikolojn, por liberigi sin de viaj trooftaj vizitoj.

Certe dum la jaro multaj gazetoj publikigis artikolojn el niaj broŝuroj, eĉ tradukis ilin, sed tio ne sufiĉas. Ni devas aranĝi ke nia programo aperu en ĉiu gazeto esperantista en la mondo.

Kiel multaj el vi scias, Esperanta Psikistaro aliĝis al U. E. A. kaj tiu granda organizo metas je nia helpo, siajn servojn.

La lastan jaron mi estis devigata diri ke la mona stato de nia unuiĝo estis tre malbona. Ni eble ricevis 50 aliĝojn kiuj pagis pli aŭ malpli ol 60 au 70 frankojn. Tio eĉ ne sufiĉas por kovri niajn poŝtelspezojn, kaj vidu kiel grandaj estis la elspezoj (ekster la korespondado, ĉar ne estas eble tion kalkuli) :

Ni eldonis 1000 ekzemplerojn de „Raporto pri la Subkongreso“ kaj forsendis ilin. Kosto fr. 200.—. Ni presigis 6000 „Kurso pri Teologio“ Pres-kaj sendkostoj frs 600.— Tio faras frs 800.— nekalkulante la aliajn pli malgrandajn elspezojn.

Sed, Gesinjoroj, ne malesperu. La Belga Spiritista Federacio, nia bonfaranto, pagis ĉion, sed vi bone komprenas ke tio ne povas daŭri. Esperanta Psikistaro devas trovi sian propran monon. La kotizaĵo tamen estas tro malgranda por ebligi nin eldoni fruktodonajn publikaĵojn.

La grava punkto, kiun ni devas solvi, dum la nuna kongreso, estas jena :

Esperanta Psikistaro volas eldoni trimonatan revuon. Por starigi tiun aferon ni bezonas 300 aliĝojn po 1 Sm. ĉiujare.

Trovi 300 aliĝojn „that is the question“. Jen mia propono : ĉiu el ni varbu tiom da aliĝoj kiom li povas.

Ĉiu el ni iru ĉe la influaj spiritismaj societoj kaj esperantaj kaj klopodu por ke ili aĉetu kiel eble plej multe da abonoj.

Raportu tuj al mi pri la nomoj de la aliĝontoj, kaj la Revuo de Esperanta Psikistaro ekaperos **je la 1^a de Januaro 1913.**


La apero de la „Revu de Esperanta Psikistaro“ estos la plej grava okazaĵo ĉe nia Unuiĝo.

Tiam kiam nia voĉo sonos en ĉiuj partoj de la mondo, ni povas antaŭvidi kompletan sukceson de ambaŭ ideoj kiujn ni defendas. Ni venkos, per la klopodo de ĉiuj niaj anoj.

Certe Esperanta Psikistaro ŝuldas multon al la sindonemo de niaj duoblaj samideanoj kaj mi kredas ke multaj inter vi jam malpravigas ke mi nur parolas pri grandaj okazintaĵoj, kaj ne pri la konstanta penado de niaj anoj. Sed kiel sekretario mi estas tie por esprimi la dankon de Esperanta Psikistaro por ĉiuj kiuj laboris por ĝi.

Karaj duoblaj samideanoj, klopodu kaj per via nelacigebla laboro ni starigos la 1^{an} de Januaro 1913 la unuan psikisman gazeton en Esperanto.

Vivu Esperanta Psikistaro!



JOŜA MAREŜ :

PAROLADO EN KRAKOVO

Pri mediumaj desegnaĵoj

Estis tempo, kiam materialismo regis mondon. Se la juna poeto skribis : „ en mia pokalo vino de kredo ne ŝaŭmas „, estis jam proklaminta kiel filozofo. Estis modo havi materialismajn ideojn. Sed la esploroj de Pasteur kaj Japp, esploro de radio, studoj de Ostwald kaŭzis la falon de materialismo. Kaj tiel nuntempe ne estas jam materialismo tio, kio ĝi estis iam ; jam ĝi ne posedas tian influon je nuntempa generacio kiel antaŭ kelkaj dekjaroj. Sed tamen ni devas allasi, ke ankoraŭ en hodiaŭa tempo ĝi havas siajn apostolojn kaj konfesantojn kaj tio precipe ĉe la pli juna generacio. Kaj ankoraŭ en nia dudeka centjaro estas moderne, ke homo, sin nomante progresema, pensas, ke li devas esti necese materialisto. Nome la partianoj de Libera Penso proklamas ĉiam kaj ĉiuokaze sian materialisman vidpunkton al ĉio. Mi ne scias, kiel tio estas en aliaj landoj, sed en landoj bohemiaj, kie la movado liberpensa tre estas forta kaj disvastigita, batalas la liberpensuloj furioze kontraŭ ĉio, kion la nuna oficiala scienco ne povas klarigi kaj kio estas al ĝi nekomprenebla. Bedaŭrinde, mi devas konfesi, ke niaj bohemiaj liberpensuloj batalas precipe kontraŭ la okultaj sciencoj, ne konante ilin, kaj tiel tiu batalo estas kondukata laŭ nescienca maniero. Se ili jam estas devigitaj konfesi ekzistadon de la multaj faktoj, al ni vere nekompreneblaj, tiam tute oportune proklamos, ke ĉio estas nur trompo, kaj iluzio, halucinacio aŭ malsaĝaj sorĉaĵoj. Kaj la plej bedaŭrinde estas, ke tiuj tiel nomitaj inteligentuloj, progresemuloj, eĉ se oni donus la plej frapantajn dokumentojn, ne konfesos ilin, nur pro tiu ridinda kialo, ke tio ne estus moderna ! Kaj se ne ekzistas sufiĉe da argumentoj, oni alprenas tute malsciece ironion, spriton kaj mokojn, kio ja certe estas la plej oportuna maniero de la batalo, sed neinda de la homo serioza, karakterata, verama kaj honesta. Per la moko oni povas silentigi ofte honestan kontraŭulon, kiu en la sincera kaj honesta disputado estus nevenkebla, sed la vero ordinare ploras.

Oni mokas Galvani'n, nomante lin „ la dancmajstro de ranoj „, kaj li suferis pro tio multe kaj esploro lia ankaŭ, sed tamen la

estonteco proklamis, ke Galvani estis granda fizikisto kaj lia eltrovo donis al la tuta mondo grandan utilon. Kaj talenta eltrovinto de la vaporŝipo estis ĝojiĝinta la malflatan admiron de ĉiuj malgrandaj kaj grandaj friponoj, trakurantaj tra la stratoj de Baume-les-Dames kaj ne havantaj pli grandan ĝojon, ol kiam ili povis per laŭtekkrioj kaj mokoĵoj maldolĉigi la vivon de tiu bona viro, al kiu ni dankas por ebleco ŝipveturi el la Malnova Mondo en Novan.

Kaj ĉu ĉiuj novaj eltrovoj ne estis akceptataj per neespero kaj mokoĵoj? Malkonfido estis al ĉio, kio estis neordinara kaj nekomprenbla, kaj hodiaŭtempe ni staras sur tiu sama loko, kie ni troviĝis antaŭ cent aŭ pli jaroj. Moderna tempo ekskuis kaj ekmovis eble per la arĥaikaj aŭtopsioj de nia vasta societo, sed la kontraŭstaron kaj antipation al novaj aferoj, precipe al novaj pensoj kaj ideoj, ĝi ne forigis. Kaj de tiu antipatio estas indulgitaĵe eĉ ne la scienculoj, ja ili ofte faras grandan eraron, ke ili neas a priori ĉion, kio kun iliaj ĝisnunaj spertoj ne konsentas. Spiritismo estas la plej bona dokumento de tio. Kvankam ĝi mirinde estas disvastigita en la tuta mondo, tamen ekzistas tro multe da skeptikuloj, proklamantaj ĉiujn mediumojn kiel trompantojn, kaj tiujn, kiuj kredas ilin, kiel malsaĝulojn.

Sed eĉ la plej obstina dubulo ne povas jam malkonfesi tian multegon da faktoj de manifestoj de okultaj naturfortoj. Ni devas jam konfesi tiun malnovan sentencon de Hamlet: « ekzistas aferoj sub la ĉielo, pri kiuj ne havas antaŭsentojn nia filozofio ».

La scienco rifuzas ĉiun miraklon, penante klarigi ĉiun aperaĵon naturan per la tute natura kaŭzo. Kaj tute ĝuste! Ĉar ne estas en la mondo mirakloj kaj supernaturoj! Supernaturo ne ekzistas! Ĉio, kio en la naturo fariĝas, necese per la vojoj naturaj fariĝas! Flanke estas, se al niaj sentoj estas tio nekomprenbla, aŭ se nia sperto kaj intelekto ne povas la fenomenojn klarigi. Ke nia intelekto ne kapablas ion, el tio oni ne povas dedukti, ke tiu ĉi « io » estas supernatura, aŭ — se ni ne kredas en supernaturo — ke tio estas trompo kaj nerealeco. Kontraŭe: tio montras, ke nia intelekto ne estas ankoraŭ tiel matura kaj perfekta, ke ĝi povu tiajn fenomenojn klarigi. Ja, kio hodiaŭ estas neklariĝebla, tio morgaŭ estos la fakto komune konfesata.

Ĝisnunaj sciencaj konoj ne sufiĉas al klarigo de tiuj ĉiuj fenomenoj, per kiuj okupas sin sekretaj sciencoj, kaj nia oficiala scienco troviĝus sur la erarvojo, se ĝi ne repaciĝus kun la penso, ke ankoraŭ multe estas kaŝita antaŭ la homa vidado, kaj la naturo ne diris ankoraŭ sian lastan vorton, eĉ ke ĝi ne malfermis antaŭ ni sian misteran libron. La oficiala scienco,

kiu okupis kontraŭ mediumaj fenomenoj vidpunkton rifuzan, nun komencas konfesi ekzistadon de fortoj ĝisnun ne esploritaj, kaj tiel — paŝo post paŝo — ankaŭ eĉ de la plej modernaj sciencoj, kiel okultismo, spiritismo k. simile. Ne faras tion la oficiala scienco libervole, sed — mi dirus tiel — ke ĝi estas pli — malpli devigata de la samaj fenomenoj, kiuj ĵus devigas esploradi ilin. Ne estus konvena, se mi nun citus autau vi, tre estimataj, ĉiujn tiujn fenomenojn, kiuj certe ne estas al vi el teorio kaj praktiko nekonataj. Celo de mia hodiaŭa parolado estas la pli proksima ekkono de nur unu fakto efektive mirinda, kaj meritanta nian atenton. Ĝi estas la mediuma desegnado.

Certe almenaŭ el teorio de spiritismo ĉiu el vi aŭdis pri la desegna mediumeco.

Sesjara Mozart ludis komponaĵojn, al kies vera kompreno ne atingos lerta muzikisto post longjaraj, konsumiĝantaj studadoj, tiel ke ĉiu aŭdanto miregis.

Kiel troviĝas tiel granda talento ĉe la knabo tiel juna sen antaŭa fakedukiteco?

Ekzistas kapabloj, kiuj donacitaj estas al iuj jam en junaĝo, ĉe la aliaj nur en postjaroj subite kaj neatendite ekfontos.

Similan fenomenon ni renkontas ĉe la mediumoj desegnantaj. Mi havis okazon ekkoni maloftajn kaj tre interesajn mediumojn en la landoj de bohema krono, kiuj povas laŭdi sin per ne nur multaj sed ankaŭ eminentaj desegnantmediumoj. Multe da desegnaĵoj de bohemiaj mediumoj estis dissenditaj en Amerikon, aŭ venditaj en Germanujon. « Unuiĝo de Bohemslavaj Spiritistoj » kolektas kaj aĉetas tiujn desegnaĵojn kaj kaŝas ilin en sia propra « spiritista muzeo », krom aliaj valoraj kaj gravaj dokumentaĵoj. Kelkajn ne tiel valorajn bildojn pruntis al mi la nomita « Unuiĝo » kiel montraĵojn al mia parolado.

Ni havas en Bohemujo kelkajn tre interesantajn mediumojn, de tiu ĉi fako, kaj vi permesos, tre estimataj, ke mi pri tiuj plej interesaj iom parolu.

La plej valorajn desegnaĵojn ni havas de la juna viro Sro. Emr el Praha, profesie ĝardenisto, kiu ne akiris altan klerecon, irinte nur kvarklasan popollernejon en malgranda urbeto.

Li alvenas el laboro, sidiĝas ĉe la tablo kaj prenas la penikon aŭ kolorigajn kraĵojn, ŝanĝas florejon por la desegna papero kaj fariĝas artpentristo. Li desegnas rapide kaj tiajn bildojn, kiuj plenigas eĉ fakpentristojn per mirego, kiel teknike kaj sperte, tiel enhance. Havas tiuj desegnaĵoj vere karakteron neordinaran, maloftevideblan, presentante al ni scenojn el la nekonataj sferoj.

Kiel se mistera forto estus reganta tutan lian korpon, farante el li sian ilon, senvolan, li ne antaŭsentas, prenante krajonon en sia mano, kion ĝi estas desegnonta ; li ne pripensas, ne mezuras, ne kombinas ; sen iuj ajn skizoj, modeloj li desegnas ; kaj post mallonga tempo oni povas vidi bildon en puraj koloroj.

Li sidiĝas. Lia mano komencas per mirinda rapideco skizi la planon de la desegnaĵo. Kiam ĝi estas preta, elprenas kolorkrajonojn ne al ili rigardante. Li metas kun akurateco koloro sur koloro, kaj sub lia mano kreskas ornamoj puraj kaj belaj, de freŝaj koloroj, ordinare nesimetraj, kiel oni ordigus diverskolorajn florojn en la tapiŝoj de bedoj.

Kaj kiel heterogena estas la enhavo de tiuj desegnaĵoj ! Zoologiisto trovas tie diversan faŭnon de la tempoj prahistoriaj, botanikisto, mirindajn vegetaĵojn kaj fruktojn, strangajn florojn, montrantajn duone birdon, duone floron ; arĥitekturisto tre kuriozajn konstruaĵojn de kanaloj, precize ellaboritajn, aerajn konstruaĵojn de mirindaj formoj, pendantajn pontojn kiel el la vitro konstruitajn. Mineralogiisto vidas tutan montaron de kristaloj kaj glacejoj, kiuj brilas per la sepkoloraj, blindigantaj koloroj. Kelkaj bildoj interesas per sia profundeco mistikemulon, bildoj montrantaj, kiel la spirito ekvekiĝinte el la dormo de morto, rigardas al pordego, iranta en pli altajn mondojn.

Aliaj bildoj reprezentas al ni ekzemple scenojn de konstruado de piramidoj, la egiptan faraonon kiel akceptas planojn al konstruoj, kiel li en sia palaco bonvenas senditaron. Juna Budho kun siaj edukantoj en ĝardeno. Tie denove grandega aparato, per kiu oni sur planedo Mars frakasas tutajn ŝtonegojn kaj tuj konstruas murojn de kanalo ; rozaj pejzaĝoj, amasego da glacio, dezertoj sen vegetaĵoj aŭ bestaro. Scenoj el la vivo de Kristo estas oftaj : ekzemple, vojaĝo de tri sanktreĝoj en Betlehemon, dum la lunradianta nokto, kun armaĵportistoj kaj servistoj, kun tendoj kaj kameloj ; krucigo de Kristo laŭ antikva ideo ; Kristo en preĝejo, apud la Jordano kun Johano Baptisto interparolanta, sur la dezerto preĝanta. Artbildo ideas (montras) la devenon de l'mondo : brulintaj gasoj kunpuŝigantaj en materio. Giganta aparato ekkaptadas sunradiojn, rompas ilin en la grandegaj triangulaĵoj vitraj kaj per la diverskoloraj radioj oni detruas la malutilajn bakteriojn en la tuta ĉirkaŭaĵo. La amaso da aerostatoj direkteblaj : sur la bela bildo flugpendas silente aerostato super la belega pejzaĝo, aerostato tiel detale farita, ke ŝajnas al ni ke donante al ĝi nur la movan forton ĝi povus flugi.

Ornamdesegnaĵoj estas multaj, ili distingiĝas per la tre helaj koloroj kaj strangaj formoj.

Oni povas rimarki, ke tiu ĉi juna ĝardenisto, ne estas specialisto, sed li desegnas preskaŭ ĉion. Liaj bildoj estas preskaŭ unu kvadratmetron grandaj; dum tri monatoj li faris da ili sepdek. La mediumdesegnaĵoj estas, kiel mi jam antaŭe diris, havo de la „Unuiĝo de Bohemslavaj Spiritistoj“, kiu aĉetis ilin porkelkaj centojda kronoj ĵus, kiam ili estis venditaj en Germanujon. Ili estis jam ofte ekspoziciitaj ĉe diversaj ekspozicioj, kie fakdesegnistoj, artpentristoj esprimis tre laŭde pri ili.

Eĉ la aliaj mediumoj estas atentindaj, kaj ĉiu distingiĝas per ia specialeco en sia fako. Tiel ĉe unu estas rimarkindaj ekzemple desegnaĵoj de la tapiŝoj diversfasonaj, tre delikate faritaj. Alia mediumo paŝtelas iajn transkondukojn el la kreskaĵaro en bestaron, iajn duonbestojn, duonflorojn. Ia fabriklaboristo pentras precipe bildojn simbolajn, ekzemple: Simbolo de la reganta malbono; de harmonia homo; en la ŝipo de vivo, k. a.

Interesa estas mediumo, maljunulino okdektrijara (naskiĝinta en jaro 1829), ordinara kamplaboristino, tute malkera, kiu en la normala stato ne scias eĉ subskribi. Tiu virino paŝtelas bildojn de la harmoniaj diverskoloroj kaj tio per granda rapideco: dum 15-20 minutoj unu desegnaĵon.

Ĉiuj tiuj mediumoj estas homoj ordinarprofesiaj, kiuj malfacile kaj penade devas labori por vivi. Estas tio preskaŭ homoj tre malkleraj, vizitintaj nur popollernejon vilaĝan; malbone kaj malfacile ili skribas, ĉar iliaj kalaj kaj ellaborigitaj manoj kutimis nur al klopodo metia aŭ kampa. Tre ofte ili ne havas talenton desegni kaj en ordinara vivo ne estas kapablaj desegni eĉ la plej elementajn skizojn, kiujn facile desegnus infano de elementarlernejo. Al tiu ĉi malkapableco ni ne povas miri, konsiderinte ilian edukitecon kaj ĉiutagan klopodan laboron; sed vere ni ne povas nin defendi de mirego, rigardante iliajn pentraĵojn, elfaritajn sub la influo de sekreta forto.

Laboristo, teksisto, masonisto, tajloro, ĝardenisto sidiĝas vespere post la tuttaga klopodo ĉe la tablo, sur kiu troviĝas blanka papero kaj flanke kelke da kolorkrajonoj. Li ligas sian animon en la sekreta peto kun la forto spirita, nevidebla. Post momento li eksentos ian ekstremon de nervaro, kiel tra lia korpo trapasus elektra fluo. Netrompa antaŭsento, ke fremda inteligenteco intelekta, kvankam nevidebla, partoprenas je tiu laboro kaj faras el la ordinara, simpla homo, por kelkaj momentoj artpentriston, kiu kun mirinda rapideco pentros bildon antaŭe nevidatan. La propraj pensoj restas absolute pasivaj; la pentranto povas kun vi interparoladi pri tute aliaj aferoj, okazos eĉ, ke la mano mem elprenas bezonajn krajonojn, eĉ la mediumo

ne rigardas, kie tiu kraĵono kuŝas. La medio de desegnas ne nur rapide, sed ankaŭ certe kaj precize. La medio Sro. Lissa en Praha desegnas ekzemple la astralajn ekzistaĵojn hom-portrete sur la ordinara skribpapero blanka, sur kiu ne estas ebla ion deviŝi kaj korekti, ke tio ne estu tuj videbla. Desegnaĵoj de tiu ĉi medio estis tiel strangaj kaj kuriozaj, ke la aŭstria ŝtatoŝtato malpermesis publikigon de tiuj bildoj, ĉar — kiel oni diras — per ili oni disvastigas superstiĉon inter popolo.

La plej rimarkinda estas eble Franco, Desmoulin, kiu tre ofte estas venkita de la nevidebla forto, deviganta lin preni kolorkraĵon kaj kondukanta lin manon dum la desegnado. Tiu fenomeno okazas dum iu ajn horo taga aŭ nokta. Dum tiu tempo li estas konsciante sian laboron kaj ne entranciĝas. Se li rigardas sur desegnaĵon antaŭ, ol ĝi estas farita, la kraĵono estas al li elprenita el mano, aŭ la papero suprenflugas. Ifoje la pentrado komencas tute kontraŭmaniere, sed rezultato ĉiam estas preciza kaj perfekta. (1)

Angla medio Sime vidadis ofte fantomojn de bestoj; dum la rigardo al tiuj aĵoj li estis kiel ensorĉita kaj ne povis eĉ per unu muskolo moviĝi. Tuj kiam la fantomoj malaperis li estis iel devigata reprodukti sur papero fantomojn, ĵus viditajn.

Preskaŭ tute estis forgesitaj okazoj de la angla medio William Blake, vivinta en la dua duono de dekoka centjaro. Blake jam en sia junaĝo montris kuriozan talenton al desegno. Dum la tuta sia vivo, li estis en ia ekscito, kaj en siaj pentraĵoj eĉ en siaj poemoj esprimadis la plej strangan koncepton. El la spiritista vidpunkto estas tiu ĉi okazo per tio interesa, ke — laŭ lia certigo — aperadis al li Moses, Homero, Milton kaj aliaj mortintaj genioj de malnovaj eĉ novaj epokoj kaj sidiĝis antaŭ li, por ke li povu pentri portretojn. Krom tiuj portretoj, kiuj estis mirindaj ekzemploj de la arta inspiro, Blake ofte desegnis fantaziajn kreaĵojn. El multaj liaj poemoj estas videble, ke li vere estis ankaŭ poeta genio; intereso por supernaturo kaj simboliko en ili ĉie superas. Sekve de tiuj strangaj aperoj en lia vivo, Blake estis ofte proklamita kiel frenezulo, sed en spiritistaj rondoj oni kredis, ke li estas kromordinara medio.

Simile fantaziajn pentraĵojn desegnas Sino Altman, itala vilaĝanino. Tiu virino entranciĝinte faris serion da paŝtelaĵoj, kiujn ŝi desegnis havante siajn okulojn fermitajn. Ŝiaj skizoj estis simbolaj, reprezentataj batalon inter materialismo kaj

(1) S^o Desmoulin estas talenta gravuristo kaj pentristo; sed liaj rimarkindaj mediaj desegnaĵoj estas tute diferencaj de liaj personaj verkoj. — Ni bedaŭras ke S^o Mares ne aŭdis ankau pri Hugo d'Alési. — (Noto de la Redakcio).

spiritualismo. Ofte ŝi ankaŭ desegnas loĝantojn de planedo Mars, kia desegnado estas certe amata objekto de multaj mediumoj. Tiel ekzemple mediumo Sino Helen Smith, kun kiu multe eksperimentas ĝeneva profesoro Flournoy, portretas Marsanojn, tre simile al homekzistaĵoj. Nu, se ni estus kritikantaj laŭ tiuj portretoj, la Marsanoj vere ne estus beluloj: kapojn ili havas tre mallongajn kaj largajn, vizaĝojn senbarbajn, okulojn malgrandajn, sed anstataŭ tio buŝon tro grandan kaj nazeton kiel fabeto. Nu, kiel mi diras, tiajn belulojn certe niaj teraj belulinoj ne enŝtus al la loĝantinoj de Marso. Tiu Sino Smith — kiel oni diras — aŭdas en tranco la marsan lingvon, kaj eĉ ĝin elskribas; en la bohema traduko de l'angla artikolo pri mediumaj desegnaĵoj, publikigita en amerika ĵurnalo «Magazine» (Chicago, 27-6-1909) mi legis, ke jam nomita prof. Flournoy konas la skribon eĉ povas traduki (!). Mi akceptis tiun ĉi komunikon kun granda dubo, ĉar nenie alie mi legis pri tiu afero, sed grandĝoje mi volus scii, kio estas en tiu komunikaĵo vera kaj kreinda.

Pri la amiko de mondfama franca astronomo Sro Flammarion, pri Victorien Sardou estas konate, ke li estis tre eminenta desegna mediumo. Li desegnis pitoreskajn kaj surprizajn bildojn, kies celo estis prezenti objektojn kaj ekzistaĵojn de planedo Jupiter. Kelkajn bildetojn publikigis Sro Flammarion en sia populara verko «La nekonataj naturfortoj». Tiel ekzemple montras al ni unu desegnaĵo la loĝejon de Mozart, domon de Zoroastro, de Bernard Palissy, kiuj — oni diras — troviĝas sin proksime sur tiu ĉi grandega mondo. Kritikon pri tiuj desegnaĵoj ni povas fari el tiuj ĉi du reproduktaĵoj (*ukàzat!*), kiuj prezentas al ni domon de Zoroastro kaj «loĝejon de bestoj» ĉe tiu sama filozofo. Ni vidas florojn, pendantajn retojn, flugantajn estaĵojn, kaj sur la tero iajn inteligentajn bestojn, ludantajn specialan kegloludon. «Tiuj ĉi interesaj desegnaĵoj pruvas» — diras Sro Flammarion — «ke la subskribo, *Bernard Palissy sur Jupiter*» estas falsa, kaj ke tio ne estas gvidspirito, loĝanta tiun planedon, kiu gvidis la manon de Victorien Sardou. Kaj ankaŭ tio ne estas la anima aŭtoro, kiu eble antaŭe estus elpensinta kaj pretiginta tiujn skizojn kaj estus farinta ilin laŭ la preciza plano. Victorien Sardou troviĝas en stranga «mediumeco», en kiun li estas enkondukata nek per la magnetizado nek per la hipnotizado, eĉ li ne estas dormigata alimaniere. Sed nia cerbo ne restas indiferenta kaj apatia al tio, kion ni faras; ĝi sendube influas kaj efikas per la reflektita movo je niaj nervoj. Do, ni ĉiuj opinias, ke sur planedo Jupiter vivas raso pli perfekta: tiuj komunikaĵoj estis do rebrilo de la komuna opinio. Hodiaŭ ni opinias nenion

similan pri tiu ĉi planedo, kaj spiritistaj seancoj ankaŭ neniel instruis nin pri tio, kio estas en astronomio enhavata. Tiaj rezultatoj pravas neniamaniere la peradon de spiritoj ».

Do, tion diras Sro Flammarion pri la desegnaĵoj de Sro Sardou. Sro Sardou mem opinias pri ili tiel: « Se mi parolas pri miaj » domoj sur Jupiter mi devus demandi tiujn bonajn homojn, pensantajn, ke mi estas konvinkita pri ilia realeco, ĉu tiuj bonuloj estas konvinkitaj pri tio, ke Guliver kredis en siaj « Liliputanoj », Campanella en sia « Sunurbo », kaj Thomas Morus en sia « Utopio ». Sed estas vere, ke la desegnaĵo (obr. 3) estis preta dum malpli ol dek horoj. Por la originalo mi ne donus eĉ kvar *sous*, — sed la fakto mem, jes tio estas io tute alia.

Al Sro Flammarion alportas aŭ sendadas ankaŭ diversaj medioj siajn multajn desegnaĵojn de floroj kaj bestoj el Luno, Mars, Jupiter, Venus aŭ el aliaj astroj. Sro Flammarion kritikas ilin kiel pli-malpli belajn kaj pli-malpli interesajn. Mi konsentas kun lia opinio — kaj pri tio vi povas, tre estimataj, ankaŭ konvinkiĝi memtrarigardonte desegnaĵojn, kiujn mi permesas min montri al vi, — nome, ke « ĉiuj tiuj interesaj desegnaĵoj similas sin per la maniero, per kiu ili estas desegnitaj, kaj ke ili portas iun mediumsignon. Kompreneble, ke ne nur ili ne povas nin konvinki, ke vere ili prezentas objektojn realajn, sur aliaj planedoj ekzistantajn, sed kontraŭe ĉio pravas, ke tio estas fruktoj de la fantazio en sia substanco forme eĉ vide surteraj, neniel similaj al niaj konoj pri la vivkondiĉoj de tiuj mondoj. Desegnistoj estas viktimoj de iluzio. Tiuj floroj kaj tiuj ekzistaĵoj estas ofte elegantaj metamorfozoj kaj aliformiĝoj de l'organismoj surteraj ».

Pli-malpli ni eble povus al la opinio de Sro Flammarion jesi.

stas vere, ke tiuj desegnaĵoj ne povas nin konvinki pri tio, ke la pentritaj objektoj efektive ekzistas. Sed tiel mi opinias, ke oni ne povas certigi, ke simila kreaĵo tute neekzistas. Iaj homoj konsterniĝis antaŭ la strangaj nomoj de kreskaĵoj kaj simile. Sed pro la fantazia, nekutima nomo, aŭ pro mirinda, kromordinara impreso ni tamen ne povas nei la ofte artan valoron de la desegnaĵo kaj nepre jam la manieron de la desegnado.

Restu flanké la demando, ĉu la desegnaĵoj vere prezentas efektivajn objektojn el aliaj steloj, kaj ni kritiku la desegno-manieron kaj la desegnaĵojn mem. Decide estas la maniero de la desegnado mirinda. Unue desegnas tie homo nescianta preskaŭ tute desegni, kaj ni bone scias, ke en normala stato li absolute ian bildon ne desegnus. La medioj laboras senkonscie aŭ parte senkonscie, kvankam ekzistas okazo, ke medio desegnas

en la absoluta konscio. Ĝi desegnas senprezare, ofte sur la ordinara skribpapero, ofte per sufiĉe maldelikataj kraĵoj; senripense, nekorektante, per la mano certa kaj preciza, kaj tre rapide.

Multaj desegnaĵoj estas artvaloraĵoj. Lã beleco de koloroj, precize de konturoj prilaboreco estas vere mirindaj. Miregis min, kiel estas eble ĉe la lamplumigo en nokto krei tiajn kolorharmoniojn tiel delikate nuancatajn. Mediumoj neniel scias, kiajn kraĵojn ili elektas. Mi mem iafoje ŝanĝis la paŝtelojn, apud la mediumo kuŝantaj, sed ĝi tamen tute certe kaj rapide elektis bezonatan paŝtelon, eĉ ne rigardante je ili. Same ankaŭ la mikrado de kolorotonoj per paŝteloj, kiel eĉ nuancoj de koloroj, atestas la eminentan artkapablecon en la desegnado. Mi demandas: kie kaj kiamaniere atingis mediumoj tian kapablecon, al ili certe necesan? Kaj kiu aŭ kio efikas ĉe tiu ago kaj kial? — Ĉu povas al ni iu doni klarigon?

Mi pensas, ke mediuma desegnado estas fakto vere grava, kiu postulas, ke la homa prudento pli multe interesiĝu pri ĝi. Serioza homo ne povas lasi tiujn demandojn senrimarke. Ĝis nun ni ne povas doni rezulton en tiu afero, kaj eĉ ne kontentigan klarigon. Ni staras antaŭ la manifesto de ia forto, vereble natura, ne konante ĝin, ĉar ĝi kaŝita restas antaŭ niaj okuloj.

Spiritistoj akceptis hipotezon, ke la kaŭzo de tiuj laboroj estas ekzistaĵoj sinkonsciaj, inteligentaj, superkonaj kaj superkapablaj al mediumo mem, kaj ke celo de tiuj desegnaĵoj estas prui al la homaro ekzistadon de spirito post la morto. Mediumo estas tute nelibervola artisto, influata de spirito de ia mortinta genio, kiu sin manifestas per tia mirinda maniero. Kaj ni vole, nevole devas konfesi, ke vere tiu ĉi hipotezo klarigus la mediuman desegnadon plej bone. Sed, se ni ne konfesas tiun hipotezon, ne estas tio kaŭzo por nei la fakton mem. Certe ĉio havas sian celon. Eble ĝustatempe ni scios pli multe. La afero estas interesa kaj eble pli grava ol ĝi ŝajnas. Estus certe jam bezone, ke iu el la vico de « oficialaj scienculoj » sin dediĉu al la detala esplorado de tiu objekto, tiel, kiel estas esplorataj aliaj faktoj spiritismaj. Nur sincera kaj scienca eksperimentado kaj esplorado povas alporti lumon, purigi spiritismon de la antaŭjuĝoj de oficiala scienco eĉ de la superstiĉoj de ortodoksaj spiritistoj; nur la scienca esploro povas levi spiritismon je efektiva scienco kaj helpi tiel al la plua perfektigo de la tuta homaro!

Kaj al tiu ĉi radiobrilanta celo iru ĉiu nia penado: *Per la scienco kaj progreso al la fratigo de l'homaro!*

LETERO DE S^o CHAIGNEAU (PARIS)

AL LA SEKRETARIO

Villeneuve-la-Comtesse (Francujo), la 7^{an} de Aŭgusto 1912.

Kara amiko,

Mi tre bedaŭras ke mi ne povos iri Krakovon, por la 8^a universala kongreso de Esperanto, kaj, speciale, ke al mi ne estos eble ĉeesti, apud vi, la 2^{an} Kongreseton de *Esperanta Psikistaro*.

Tamen, konservinte la plej bonan memoron pri la 1^a, en Antverpeno, mi estos kun vi ĉiuj per la penso, kaj mi petas vin, tre sindona zorganto de nia Unuiĝo, ke vi bonvolu saluti plenkore, en mia nomo, niajn karajn duoble gesamideanojn. Ĉefe mi salutas nian eminentan honoran prezidanton, Rektoron Boirac, kies helpo estas por ni tiel grandvalora, — kaj nian fervoran organizinton kaj akceptanton, Doktoron Rosenstock, kies kunlaborado faras al ni plej grandan honoron.

La pasintan jaron, en Antverpeno, mi prezentis specimeĥon de „Psikisma Terminaro“, afero tre dezirinda, kaj vi bonvolis ĝin presi en la raporto. Do, eble, kelkaj gesamideanoj pripensis pri tiu ideo, kaj mi esperas ke ili alportos rimarkojn, novajn elementojn, kaj ankaŭ, kompreneble, kritikojn. Mi rememorigas ke mi prezentis nur ĝeneralan ideon, kun mallonga specimeno, ĉar mi opinias ke la verko mem devas esti kunlaborada. Do mi deziras ke oni korektu tion kio ne ŝajnos ĝusta, kaj ke oni aldonu novajn vortojn kun difinoj. Oni konservu ankaŭ ilin en raporto; kaj same la venontajn jarojn. Tiamaniere, la aro de terminoj kreskos iom post iom, kaj, kiam ĝi estos sufiĉa, oni povos ĝin kontroli en estonta kongreseto, kaj poste, ordigante la elementojn, oni povos plenumi la verkon; la aro de terminoj, per kreskoj kaj komunaj korektoj, fine fariĝos la Terminaro.

Antaŭ ol fini tiujn kelkajn memorvortojn, — mi volas, kvankam li ne partoprenas en niaj kunvenoj, saluti nian altestimatan karan Majstron Doktoron Zamenhof, kiu donis tiel favoran aprobon al „Esperanta Psikistaro“, kaj mi deziregas ke la bonfarantaj psikaj fortoj superversu lin, potencigante al li longan surteran vivadon, por la bono de Esperanto.

Mi volas saluti ankaŭ fervoran apostolon de Homaro kaj amikon de Esperanto, kiu afable kuraĝigis nian entreprenon. Eble li estos inter vi, sed vi ne vidos lin; ĉar li eliris el la karna vivo, antaŭ kelkaj monatoj. Mi parolas pri la fama angla publicisto William T. Stead, kiu serene pereis en la terura katastrofo de l'Titanic. Mi deziras ke komuna saluto, al li sin turnanta, altiru sur viajn kunvenojn lian favoran influon, kaj ke li helpu vin en viaj eksperimentoj.

Al vi ĉiuj, geamikoj, saluton kaj bonan sukceson !

Vivu Esperanto ! Dank'al Esperanto, vivu la venonta efektiviĝo de la harmonio en la surtera Homaro ! Kaj, per la certa kono de la postvivo, vivu la espero pri la plena efektiviĝo de la harmonio en la Homaro integrala, kiu estas senmorta en siaj individuoj kaj en sia tutaĵo !

J. CAMILLE CHAIGNEAU

(Kamij' Ŝenjo')

P.-S. — Pri W. T. Stead, mi ĵus esperantigis rimarkinde gravan dokumenton, publikigitan en la angla psikisma gazeto *Light* (la 8^{an} de junio). Ĝi estas letero de tre ŝatinda serba diplomato Sr^o Chedo Mijatovich. Mi estus volinta presigi ĝin, esperante tradukitan, por propagando en Krakovo; sed bedaŭrinde, ne estis sufiĉe da tempo. Kredeble ĉiuj *psikistoj* konas tiun leteron, pro diverslingvaj tradukoj; sed, okaze ke « Esperanta Psikistaro » havus *propagandan* kunvenon, eble oni povus tiam profite legi la tradukon esperantan.

J. C. Ch.



RIMARKINDAJ MANIFESTAĴOJ

de elkarniĝinta nia fama kaj sindona samideano

William T. STEAD

Letero de S^{ro} Chedo Miyatovich

en la angla gazeto LIGHT, 8^{an} de junio 1912

(ESPERANTA TRADUKO)

Aŭg. 1912.

Post kelke da hezito, pro personaj motivoj, mi alvenis la konkludon, ke estas mia devo por la neforgesebla memoro de mia kara amiko William T. Stead, kaj ankaŭ por grava afero, sendi la jenan leteron al la eldonisto de *Light* por ke ĝi estu tie publikigata.

Profesie mi estas diplomato, havinte la honoron reprezenti mian landon (Serbujon) ĉe la kortego de l'reĝo de Rumanujo, ĉe la Superega Pordo, trifoje ĉe la kortego de la reĝino Viktoria kaj unufoje ĉe tiu de l'reĝo Eduardo VII^a. Plie, mi estis komisiata de mia registaro por multe da gravaj diplomatiaj misioj kaj reprezentadoj ĉe internaciaj konferencoj. Mi estas membro de multaj sciencaj Societoj sur la kontinento, kaj honora membro de la "Royal Historical Society" el Londono. Mi citas tiujn personajn detalojn por ke viaj legantoj opiniu ke mi estas homo kutimiĝinta pesi la faktojn kaj miajn proprajn parolojn en plena konscio de mia respondeco. Mi devas aldoni ke de multaj jaroj mi interesiĝis pri la scienca studo de la psikaj fenomenoj, ne estinte ĝis nun konvinkita spiritisto.

Eksciinte ke Sinjorino Wriedt, la fama amerikana mediu-mino, kun kiu vicadmiralo Moore faris eksperimentojn, troviĝas en la domo de S^{ro} W. T. Stead en Wimbledon, mi petis de tiu sinjorino la permeson prezenti al ŝi miajn respektojn kaj laŭ-okaze ĉeesti unu el ŝiaj kunsidoj. Ŝi donis al mi rendevuon por la ĵaŭdo, 16^{an} de majo, je la 10^a kaj duono, matene. Mi iris, akompanate de mia amiko S^{ro} H. Hinkoviĉ, doktoro en leĝoscienco kaj rimarkinda advokato en Agram (Kroatujo), kiu ĵus estis alveninta Londonon.

S^{ino} Wriedt akceptis nin ĉe „Julia's Bureau“, kaj diris al ni ke ŝi estas tio kion oni nomas voĉa mediumo, sed ke ankaŭ, kiam la kondiĉoj estas favoraj, materiigantaj spiritoj povas sin vidigi. Ŝi petis nin ekzameni, se ni volus, la kabineton kaj la ĉambron. Sed, ĉar en antaŭa okazo, mi estis veninta en tiun ĉambron kaj ekzameninta la kabineton kun kelkaj germanaj doktoroj, mi ne opiniis necese tion fari denove.

Ni sidiĝis, D^{ro} Hinkoviĉ kaj mi, unu apud la alia, ĉe l'centro de la ĉambro, kontraŭ la kabineto. S^{ino} Wriedt ne eniris la kabineton, sed restis la tutan tempon sidante sur seĝo apud mi. Ŝi lokis ladan paroltubon (megalofonon) antaŭ mian amikon; poste ŝi ekfunkciigis aŭtomatan muzikilon kaj estingis ĉiujn lumojn. Ni restis en plena mallumo.

Post kiam finiĝis beleta melodio, kies karaktero estis iom religia, S^{ino} Wriedt diris al ni ke la kondiĉoj estas bonegaj, kaj ke kredeble ni povos ne nur aŭdi sed ankaŭ vidi spiritojn. „Jes, ŝi daŭrigis, estas tie ĉi la spirito de juna virino. Ŝi faras al vi signon per la kapo, S^{ro} Mijatoviĉ; ĉu vi ne vidas ŝin?“ Mi ne vidis ŝin, sed mia amiko vidis nebulecan formon oblongan kaj lumplenan. „Ŝi mallaŭte diras al mi, daŭrigis S^{ino} Wriedt, ke ŝia nomo estas Mayell, Adela aŭ Ada Mayell“.

Mi estis miregigita. Antaŭ nur tri semajnoj estis mortinta Miss Ada Mayell, tre kara amikino, por kiu mi havis multe da alligiteco. Sed en tiu momento ŝi ne faris plian elmontron. Ŝi malaperis dirinte nur sian nomon.

Iom poste, malantaŭ la mediumino, aperis lumo kiu sin direktis de la maldekstra flanko al la dekstra de la kabineto, kvazaŭ malrapide forportata de dolĉa venteto. Kaj tie, en tiu lumo trankvile moviĝanta, ni baldaŭ vidis ne la fantomon, sed la personon mem de mia amiko William T. Stead. Li estis ne drapirita per blanka tolaĵo, kiel mi vidis kelkajn spiritojn en aliaj kunsidoj, sed vestita kiel li kutimis promenante. S^{ino} Wriedt ĝoje ekkriis, samtempe kiel mi. Mia amiko Hinkoviĉ, kiu konis S^{on} Stead nur per liaj fotografaĵoj, diris: „Jes, tio estas ja S^{ro} Stead!“

La spirito de S^{ro} Stead faris al mi amikan signon per la kapo kaj malaperis. Post duono da minuto li vidiĝis denove kaj staris kontraŭ mi (sed iom supre de la pargeto) min rigardante kaj salutante. Iom poste, li reaperis trian fojon, kaj ni tri vidis lin, ankoraŭ pli klare ol antaŭe. Post tria malapero, mi sentis ke la paroltubo sin direktas al mia vizaĝo, kaj ni tri aŭdis tre nete la jenajn vortojn:

„Jes, mi estas Stead — William T. Stead! Kaj, kara amiko

Mijatoviĉ, mi estas tre feliĉa ke vi venis tien ĉi. Mi mem venis speciale por doni al vi freŝan pruvon ke ekzistas postmorta vivo kaj ke spiritismo estas vera. Mi provis konvinki vin pri tio, kiam mi estis sur la tero; sed vi ĉiam hezitis akcepti tiun verecon ».

Tiam mi interrompis lin, dirante: « Sed vi scias ke mi ĉiam kredis tion, kion vi diris al mi ».

« Jes, li respondis, vi kredis pro tio, kion mi rakontis al vi; sed nun mi venas alporti al vi pruvon de tio kion mi diris, por ke, de nun, vi ne nur *kredu*, sed *sciu* (tiu vorto estis fortege elparolata) ke ekzistas reale postmorta vivo, kaj ke spiritismo estas vera! Nun, adiaŭ, mia amiko. Jes, Adela Mayell estas ĉi tie kaj deziras paroli al vi! »

Stead neniam konis Miss Ada Mayell dum sia tera vivo, kaj neniam ĝis nun estis aŭdinta ŝian nomon. Ŝi tiam parolis al mi laŭ sia maniero afabla kaj sindona, provante min rekuraĝigi pri kelkaj demandoj kiuj min grave priokupis de post ŝia morto, kaj dirante ke nun ŝi estas feliĉa. Ne estas motivo por raporti tie ĉi ĉion kion ŝi diris al mi, plene aŭdate de S^{ino} Wriedt kaj S^o Hinkoviĉ.

Tiam, profunde mirigante min kaj mian kroatan amikon, forta voĉo ekparolis al li per lia nacia lingvo. Ĝi estis malnova amiko, profesie kuracisto, subite mortinta pro kormal sano. Mia amiko Hinkoviĉ ne tuj rekonis lin, sed ili daŭrigis dum kelka tempo interparoli en kroata lingvo, kaj mi aŭdis kaj komprenis ĉiun vorton. S^{ino} Wriedt neniam estis aŭdinta tiun lingvon.

S^o Hinkoviĉ renversis akcidente la paroltubon, kaj, kvankam li provis ĝin remeti laŭ taŭga maniero kaj kredis ke li sukcesis, la parolaj manifestaĵoj ne estis daŭrigataj. Tuj kiam oni relumigis la ĉambiron, S^{ino} Wriedt konstatis ke la paroltubo ne estis taŭge relokita, kio, laŭ ŝi, klarigis la ĉeson de la manifestaĵoj.

Mia kroata amiko kaj mi estis profunde impresitaj de la fenomenoj je kiuj ni ĉeestis tiun tagon, 16^{an} de majo, inter la 11^a kaj la 12^a matene. Mi parolis pri ili al multaj miaj amikoj kiel pri la plej mirinda afero de mia vivo. Mi rakontis tion al la plej fama scienculino el Germanujo, Profesorino Margarette Selenka, kiu ĵus estis reveninta de Teneriffe, kie ŝi starigis sciencon studejon por la observado de la simioj. S^{ino} Selenka venis Londonon por ekscii ĉiujn detalojn pri la katastrofo de l'*Titanic* en kiu pereis ŝia granda amiko W. T. Stead. Ni aranĝis privatan kunsidon kun S^{ino} Wriedt, la vendredon, 24^{an} de majo, je la 1^a. Tiu kunsido okazis ĉe la « Julia's Bureau », sed, krom

iu voĉo kiu diris unufoje : « restu trankvila sur via seĝo ! » nenio produktiĝis. Laŭ interkonsento kun S^{ino} Wriedt, mi revenis vespere kun S^{ino} Selenka, kaj je la oka ni havis kunsidon, kiun ankaŭ ĉeestis Mrs kaj Miss Harper kaj ĉarma sinjorino kies nomon mi ne memoras. Post tre malmulte da atendo, ni vidis ĉiuj aperi S^{on} Stead, sed nur dum deko da sekundoj. Li malaperis, kaj reaperis denove iom pli nete, sed malpli ol la 16^{an} de majo. Tio estis la nura materiĝa fenomeno dum tiu vespero. Sed, kompanse, ni havis mirindajn diversajn voĉomanifestadojn. S^{ro} Stead longe interparolis kun S^{ino} Selenka, pli mallonge kun mi, rememorigante al mi cirkonstancon okazintan antaŭ du jaroj proksimume, ĉe lia oficejo en Mowbray House. — Poste, Miss Ada Mayell denove parolis al mi, dirante, inter aliaj aferoj, ke ŝi scias ke ŝiaj fratinoj kaj ŝia nevino skribis al mi, kiel ŝi tion deziris. — Poste, venis mia propra patrino kaj parolis al mi tre ameme en nia serba lingvo. — S^{ino} Selenka havis tre amikan konversacion kun sia edzo, Profesoro Lorentz Selenka, el la Universitato de München, kaj ankaŭ kun sia propra patrino, mortinta la pasintan jaron en Hamburg; tiuj du konversacioj fariĝis en germana lingvo. — Iu amiko de S^{ino} Selenka venis kanti germanan muzikaĵon, petante ke li ŝin akompanu kiel ili kutimis en la antaŭa tempo, kaj S^{ino} Selenka kantis kun li. — Poste venis Irlandano, iam marista oficiro, kiu havis longan, gajan kaj amikan konversacion kun la ĉarma sinjorino kies nomon bedaŭrinde mi ne konas, kaj je kiu la brila Irlandano ŝajnis profunde enamiĝinta. — Kompreneble, kvankam mi klare aŭdis tiujn konversaciojn en germana lingvo kaj en angla, mi ne opinias havi la rajton ilin raporti tie ĉi. Mi ne povas pli rajte rediri longan paroladon de Ĵulia pri projektoj celantaj la konservadon de Cambridge House kiel centro de psikaj serĉadoj, en memoro de Stead.

Tio kion mi volas publike deklari, estas mia profunda dankosento por S^{ino} Wriedt, kies mirinda kapablo ebligis ke mi ricevu de mia neforgesebla amiko William T. Stead absolutan pruvon de la postmorta vivo kaj de la vereco de Spiritismo. Dank' al ŝi, mi ricevis plie ĝojon kvazaŭ ĉielan aŭdante la amemajn parolojn de mia kara patrino, en nia propra lingvo. Ankaŭ ŝi donis al mi novan kaj sanktan pruvon pri la persistado de la vivanta individueco de unu el la plej ĉarmaj, fidindaj kaj sindonemaj virinoj, kiujn mi konis en mia vivo.

CHEDO MIYATOVICH

Royal Societies Club, St. James, S. W.

JENIK NOVOTNY

BOHEMUJO

Principo kaj dueco

Sentenco filozofia.

En universo estas absoluta nur tio, ke ekzistas Principo-Dio en senfine diversaj aperaĵoj. Ĉio alia estas nur relativa, kiel: tempoj, direktoj, lokoj, sciencoj, religioj kaj tiel plu. Tial, plej grava el ĉio estas, estimi, ami, kaj voli ekkoni pri la Principo-Dio, la bono, el kiu devenas tuta vivado, ĉia movado, kaj ĉio kio nur ekzistas.

Jam evangelisto Johano surskribis: „Je komenco (t. es. de eterno) estis la Vorto, kaj tiu Vorto estis ĉe Dio, kaj tiu Vorto estis Dio mem. Per Li estas ĉio farita, kaj neekzistas tio, kio neestas per Li farita.“

Nun, kiam ni jam konas ĉi tiun eldiron, estas nia devo ankaŭ voli ekkoni ordigon kaj faradon en Universo. Ni vivas, kaj ĉe tio ni sentas en nia mondo dolorojn, malĝojojn, zorgoj, timojn kaj tiel plu. Alie ni pli kredas ke ekzistas pli da malbono ol bono. Sed ni aŭdis, ke absoluta estas nur Principo-Dio-Bono, kaj ke ĉio alia estas nur relativa, tiel ankaŭ la malbono.

Kial do ni tiel kredas en malbono? Tio estas tial, ke ni ankoraŭ nekomprenas al ordigo de Universo.



Principo-Universo estas vivo. Vivo kondiĉas movadon. Movado kondiĉas du flankojn. Sen tio neestas ebla movado, kaj sen movado neestas ebla vivo. En tio ni vidas, ke estas neebila vivo-sen duflankoj. Tial ni vidas en Universo ĉie kaj ĉiam la duecon.

EKZEMPLE: Bono-malbono, Vero-malvero, Justeco-maljusteco. Beleco-malbeleco, Lumo-mallumo, Vivo-morto, Supren-malsupren. Dekstren-maldekstren, Antauen-malantaŭen. Plue ni vidas ĉie du polusojn kiel ĉe magneto, nordan kaj sudan, ĉe elektro, pozitivan kaj negativan, ĉe homoj, viron kaj virinon, ĉe bestoj kaj kreskaĵoj simile. Ankoraŭ ĝojo-malĝojo, rido-ploro, kaj tiel plu.

Ni ĝemas ĉiam je dua flanko, sed ni kontraŭe devas esti dankemaj al dua flanko, al relativa malbono, ĉar ĝi estas nur pro tio ke ni ekkonu la Bonon. Ni vidu! Kiam neestus mallumo, ni neŝatus la lumon, kaj kiam ni ne sentus la doloron, ni neŝatus

la sendoloron kaj plue. Sed ni ankaŭ neforgesu ke absoluta estas nur bono. Tio signifas ke kiam ni volas aliri al Bono ni devas ĉiam trairi malbonon. Tial, kiam ni jam scias ke malbono neestas absoluta, ne timu ĝin, kaj nur kuraĝe ni iru trans, ĉar ĉiam post malbono kaj malĝojo devas esti bono kaj ĝojo. Tio estas de eterno sankta leĝo. Kiu volas vivi, tiu devas morti. Tio signifas ke kiam ni volas anime interne vivi, ni devas morti en niaj pasioj. Nur tiam estas prava vivo ebla. Do, ni kiuj volas atingi bonon kaj meriti trankvilon kaj feliĉon, ni batalu kuraĝe kun malbono, ĉar nia venko estas certa. Batalu ni'per bono por bono!!

JENIK NOVOTNY.



LUEBLA

ESPERANTA PSIKISTARO

Entrepreno de U E A

ALIĜILO

Al S^o A. STAS

Ĉe Bureau International
du Spiritisme

WALTWILDER par BILSEN

BELGUJO

Mi sendas kune :

..... respondkuponojn

Ĉekon po Sm.

Subskribo

Plena adreso

Kotizaĵo : 1 Sm. jare, rajtigas
je unu abono al la

REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO

ESPERANTA PSIKISTARO

Entrepreno de U E A

SUBSKRIBO

Al S^o A. STAS

Ĉe Bureau International
du Spiritisme

WALTWILDER par BILSEN

BELGUJO

Mi subskribas por

.....
abonoj al la

REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO

kaj sendas kune :

..... intern. respondkuponojn

Ĉekon po Sm.

Subskribo

Plena adreso

Tarifo por anoncoj jare

1 Pago	20 Sm. = Frs 50.00	Por Francujo sola agente :
1/2 »	14 Sm. = Frs 35.00	S ^o L. LEFRANC
1/4 »	6 Sm. = Frs 15.00	5, Rue Brise-Miche
1/8 »	4 Sm. = Frs 10.00	PARIS (4 ^e)

Duoble Samideanoj vendu niajn publikajojn !

„ESPERANTA PSIKISTARO „ (KUNLABORADA VERKETARO)

Resumo de la Kurso pri Teologio

de

Kavaliro Le Clément de St Marcq

Esperantigis A. STAS

Vi recevos 10 ekz. kontraŭ sendo de 5 internaciaj reponkuponoj.

Vendoprezio : 20 cm = 8 sd.

„LA ONDO DE ESPERANTO „

MONATA ILLUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909)

La abonantoj de la jaro 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj « Princes Serebrjaniĵ », kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1.60 afr. Nun chiu abonanto de la jaro 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper libron :

„ORIENTA ALMANAKO „

el la lingvoj japana, hhina, araba, hinda, sanskrita,
persa, armena, kartvela, k. t. p. k. t. p.

« La Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstile. Chiu n-ro havas 16-24 pagh. Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustrajhoj. Belestistiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotoj. Korespondo tutmonda. (Postk. ilustr.).

Anonco en « Koresp. Fako » — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2.120 sm.), oni sendu al librojo « Esperanto » (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando), au al aliaj Esper. librojoj — posmandate, respondkupone, papermone, per bankcekoj au per transpag. de Esp. cekbanko.

LUEBLA

12